# Dua kunveno de la Teknika komisiono de SAT

Okazis sabaton, 25an de marto, 12:30 UTC+0 ĝis 01:30 UTC

## Ĉeestantoj

la prezidanto kaj aliaj tri personoj

## Tagordo

- sinprezento de la ĉeestantoj
- organiza afero: retpoŝtoj inter la partoprenantoj
- debato
- farendaj taskoj kun responsuloj

## Protokolo

### Rezultoj de la lasta sesio

Mallonga prezento de P1 por la novalvenintoj

### Debato

#### *Retpaĝaro de SAT*

P3: Ĝisdatigo de SPIP jam haveblas, kiu estas pli modernaspekta. SAT-Amikaro ankaŭ havas SPIP-bazitan retpaĝon, kiu belaspektas.

#### *Dissendolisto*

P4 proponis sin por serĉi alternativon.

P2: Ĉu OVH havas servojn (kunlaboraj iloj), kiujn ni povus uzi kiel alternativon al Google? P2 esploros tion.

P3: groups.io estas konata servo en Esperantio. Ĉu ĝi taŭgas por ni? P1 rigardos la servon kaj la kondiĉojn.

#### *YouTube*

P2: En aliaj asocioj oni uzas Peertubon. Ĝi havas pli facile uzeblajn ilojn, kaj oni havas pli da elektkapablo ol en YouTube.

#### *Ĝenerale*

P2 pri la blokado de retejoj en certaj landoj: ju pli malbone konata la servo, des malpli probable estas, ke oni blokas la servilon.

P1: Oni plu uzu servojn, kiuj ŝajnas taŭgaj por varbado aŭ disdono de informoj pri la asocio, sed oni serĉu alternativojn por la interna vivo de la asocio.

P2: pridiskuti la proponojn de kamarado en la retmesaĝa grupeto de la komisianaro. P1 sendos la dokumenton al ĉiuj.

Venonta renkontiĝo: sabaton, 13-an de majo